


SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

La Espero

2020:2

Kelkaj (ne-)gravaj okazaĵoj antaŭ

Hector Hodler
mortas



100
jaroj



Ligo de
nacioj estas
fondita post
la unua
mondmilito

Unua libro pri
la Mumintroj
aperas




75
jaroj



Dua
mondmilito
finiĝas

PIV (Plena
Ilustrita Vortaro)
aperas



50
jaroj



Unua
supersonlima
flugo de
Concorde

Svedio,
Finnlando kaj
Aŭstrio
EU-membris



25
jaroj



Windows 95
estas lanĉita

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2020 • 108-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

E-post till redaktionen:

laespero@esperantoforbundet.se

Ansvarig utgivare: Bengt Olof Åradsson

Utformning: Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

Tryck: Pingvinpress, Råå

Prenumeration: 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Postadress: Box 2276, 103 17 Stockholm

E-post: svenska@esperantoforbundet.se

Nätsida: www.esperantoforbundet.se

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

IBAN-konto: SE50 9500 0099 6034 0002 0123

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 200 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund. Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero. Tillägsexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 070-6200846

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: c/o Nordenstorm

S:t Olofsgatan 26; 753 32 Uppsala

Plusgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto-gbg.org/eldona/

E-post: eldona@esperantosverige.se

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården,

680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.esperantogarden.se

E-post: info@esperantogarden.se

Telefon: 070 767 54 55

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Kungsgatan 13B, lgh 1201; 281 48 Hässleholm;

Tel 070-200 4574

E-post: laespero@esperantoforbundet.se

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

SEF:s årsmöte hölls traditionsenligt i Kristihimmelsfärds-helgen. Sättet det hölls på var dock inte det vanliga: det var tänkt att hållas i samband med vårträffen på Esperanto-Gården i Lesjöfors, men på grund av reserestriktionerna till följd av coronapandemin fick planerna ändras. I stället träffades vi på nätet via videosamtalsprogrammet *Zoom*. Vi var 21 deltagare och det fungerade utmärkt! Mötet leddes av Puff Östling med tekniskt bistånd av Stella Lindblom och Olof Pettersson. Den som ville begära ordet kunde göra det genom att klicka på en ikon i form av en hand. Protokollet skrevs av Ann-Louise Åkerlund under pågående möte. Genom funktionen "Dela skärm" kunde deltagarna följa arbetet och när mötet var slut var protokollet klart. En klar fördel! Vi provade också en annan finess: omröstningar online. Frågorna vi skulle rösta om kom upp på allas skärm tillsammans med svarsalternativ och när alla hade registrerat sina svar visades resultatet med hjälp av stapeldiagram.

Olof Pettersson och Tatu Lehtilä hade båda av sagt sig omval. Den nya styrelsen har konstituerat sig enligt följande:

Ordförande – **Puff Östling** (omval, 1 år)

Vice ordförande – vakant

Sekreterare – **Ann-Louise Åkerlund** (1 år kvar)

Kassör – **Lotta Lauritz** (1 år kvar)

Ledamot – **Martin Strid** (1 år kvar, tidigare ersättare)

Ersättare – **Stella Lindblom** (nyval, 2 år)

Ersättare – **Andreas Nordström** (nyval, 1 år)

Som synes är en styrelsepost lämnad vakant än så länge. Är du intresserad att gå med i styrelsen, eller har förslag på någon som skulle vara en möjlig kandidat – om inte annat inför nästa år – kontakta valberedningens sammankallande Olof Pettersson med adressen valberedningen@esperantoforbundet.se för att få veta mer om vad de olika posterna innebär!

SEF:s styrelse har under flera år hållit sina styrelsemöten via Internet. Nu har vi också infört något som vi kallar *Samarbetsmöten* på torsdagskvällarna. Dessa möten har oftast ingen fastställd dagordning, utan var och en jobbar med sina uppgifter och projekt, och kan få hjälp och råd av de andra deltagarna. En grupp eller enskild medlem kan också annonsera i förväg om de vill ta upp något speciellt ämne eller projekt och inbjuda andra som är intresserade av ämnet att delta. Vi har för avsikt att lägga upp alla Samarbetsmöten i *Kalendaro* och den som är intresserad av att delta kan anmäla sig för att få länken till mötet.

Väl mött till ett nytt aktivt verksamhetsår med nya idéer och kraft att genomföra dem! I den plan som antogs på årsmötet ligger bl.a. att genomföra en språkduch, "Lingva duŝo", på nationell nivå, att göra en annonserie i Språktidningen, att lägga upp logotyper hos företag som producerar och säljer tröjor, muggar m.m. on-demand så att vem som helst kan beställa därifrån, att ordna en egen språkfestival – Sprakfest ...

Känner du att du skulle vilja vara med och arbeta med någon av dessa idéer, eller några andra, så hör av dig! Gå in på *Diskutejo* (<http://intere.se/arkivo/>) och kolla om det redan finns en tråd, eller lägg upp en själv. Tillsammans kan vi få fart på verksamheten!


Språkdagen 2020

På senaste planeringsmötet den 7 maj framkom det att EU-representationen beslutat att inte ha en “fysisk” språkdag i Europahuset i Stockholm i år, i alla fall inte under helt samma former som vanligt.

Mötet handlade mest om “brainstorming” kring möjliga alternativ: olika varianter av att livesända en presentation av de medverkande språken på plats i Europahuset, men då utan de hundratals besökande eleverna, eller att man exempelvis spelar in en film i förväg som kan göras tillgänglig på nätet.

En fördel med upplägget är ju att evenemanget blir tillgängligt för skolor (och allmänhet) i hela landet, inte bara ett dussintal skolor i Stockholmsområdet, samtidigt blir det förstås inte samma personliga möte.

Olof Pettersson



100 jaroj post la morto de Hector Hodler

La 31a de marto 2020 markas la 100-jariĝon de la morto de Hector Hodler. Tiu svisa esperantisto, kiu estis fondinto de UEA kaj motoro de la revuo Esperanto, sendube estas inter la plej gravaj laborintoj por nia afero. De la junulara agado ĝis bestoprotektado kaj la pacproblemo, de la nasko de pluraj iniciatoj ĝis la vasta kunordigo de la movado, sennombraj estis la kontribuoj de Hodler, kies vivo estis signifoplena por Esperanto. Omaĝe al li la aprila numero de la revuo estas libere elŝutebla ĉe uea.org/revuoj. ...

(La enkonduka alineo de *Gazetaraj komunikoj de UEA*, N-ro 859, 2020-03-31), Legu pli: uea.org/gk/859a1

Lia alvoko en 1915

Duonjaron post la komenco de la Unua Mondmilito, Hector Hodler lanĉis alvokon sub la titolo “Super” en la revuo “Esperanto (gazeto)” de la 5-a de januaro 1915:

“Ni havas la devon ne forgesi... Flanke de niaj simpatioj, ni havas devojn kiujn al ni trudas nia esperantisteco... devo kredi, ke neniuj popolo havas la monopolon de la civilizeco, de la kulturo aŭ de la humaneco... Devo kredi, ke neniuj popolo entute havas la monopolon de la barbareco, perfideco aŭ stulteco... Devo konservi prudenton eĉ meze de la premigaj influoj de la popolamasoj... La parolo estas nun al la kanono, sed ne eterne daŭros ĝia blekado. Kiam centmiloj da homoj kuŝos en la batalomboj kaj la ruinoj ĉe la venkintoj kaj venkitoj atestos pri la teknikaj pli ol pri la moralaj progresoj de nia civilizeco, tiam oni alvenos al iu solvo, kaj tiam,



malgraŭ ĉio, la internaciaj rilatoj denove ligiĝos, ĉar super la nacioj estas tamen io... Se sur la nunaj ruinoj ni volas konstrui novan domon, oni bezonos tiujn laboristojn, kiujn ne timigos la malfacilaĵoj de la rekonstruo. Ni esperantistoj, estu la embrio de tiuj elitoj. Por inde plenumi nian taskon, ni konservu nian idealon kaj ne lasu nin subpremi de la malespero aŭ de la bedaŭro.”


/el Vikipedio

Kalendaro

Behöver du uppdatera dina uppgifter till Kalendaro på SEFs hemsida? Använd kalendaro@esperantoforbundet.se och tänk på att vara ute så tidigt som möjligt med informationen.

- Vad händelsen kallas,
- var det händer,
- när det händer och
- vem som är kontaktperson är vad som behövs.

Lättast och snabbast är förstås om du själv går till esperantoforbundet.se och fyller i uppgifterna i startsidans vänsterspalt.



Anita D

Esperanto-Institutet har haft årsmöte

För första gången sedan 2011 har Svenska Esperanto-Institutet (SEI) haft ett ordinarie årsmöte. Detta var tänkt att hållas på Esperanto-Gården men på grund av reserestriktionerna hölls det i stället via internet-tjänsten Zoom. Det fungerade fantastiskt bra! Representanter från alla medlemsorganisationerna deltog och en ny styrelse tillsattes med Leif Nordenstorm från Förlaget i spetsen. Övriga styrelsemedlemmar är Inga Johansson och Ann-Louise Åkerlund från SEI:s tidigare direktions samt Anna Ritamäki-Sjöstrand från Esperanto-Gården.

SEI har under ett antal år fört en tynande tillvaro. Sedan vi inte längre lyckats locka tillräckligt antal deltagare till våra seminarier och kurser har vår verksamhet gått på sparlåga. För drygt åtta år sedan fick vi hjälp av Ulla Luin att formulera ett tillägg till våra stadgar som gett

oss möjlighet att spara tid och pengar genom att inte längre anordna fysiska årsmöten om inte någon av våra medlemsorganisationer krävt detta. Detta förutsatte då också att inga väsentliga förändringar skett, såsom rektors (ordförandes) avgång, påpekanden från revisorerna eller liknande.

En sådan situation hade nu uppstått i och med att tidigare rektor Lars Forsman avgått och två övriga styrelsemedlemmar aviserat sin avgång. Dessutom hade framställts krav från åtminstone en av våra medlemsorganisationer på att SEI ska upplösas.

Årsmötet den 22/5 2020 tog ett första beslut om att upplösa Institutet. Ytterligare ett årsmöte måste ta samma beslut för att det ska kunna effektueras. Detta möte kommer att hållas någon gång i början på nästa år. Under tiden har styrelsen i uppdrag att



SVEDA
ESPERANTO
INSTITUTO

utreda olika möjligheter att låta Institutet leva vidare i någon annan form, om det kan läggas vilande eller om det helt ska läggas ner. Ett möte med representanter för de olika medlemsorganisationerna planeras till hösten för fortsatta diskussioner.

Ann-Louise Åkerlund

53-a ILEI-konferenco – virtuala

Neniu fizika kunveno okazos en julio en Kebekurbo, Kanado. Sed ILEI lanĉos la *53-an Virtualan Esperanto-Konferencon ILEI* kun nomo *VEKI*, en la sama semajno, de la 25a ĝis la 31a de julio 2020. Dum sep tagoj okazos prelegoj, debatoj, babiladoj, jogaj kursoj, koncertoj kaj aliaj eventoj, per reta konekto, kiu ebligas diskutojn kaj intervenojn. Ni havos la retkanalon 24 horojn tage dum sep tagoj.

Regule la estraro de ILEI eldonos anoncojn en ĉi tiu retejo:
www.ilei.info.
Bonvolu viziti ĝin. Ni petas vin eviti okazigon de aliaj retaj eventoj dum tiuj sep tagoj!



Jarkunveno de Eldona

Pro la kronviroza krizo ankaŭ la jarkunveno de Eldona Societo Esperanto okazis per la videokomunikilo Zoom. Partoprenis deko da personoj. La estraro raportis ke multaj vendoj okazis dank' al subvencio de la Ido-Fondaĵo, kiu ebligas al la eldonejo senkoste sendi librojn al Esperanto-kluboj en aliaj landoj. La laboro pri nova Esperanto-sveda vortaro antaŭen-

marŝas. Restas ĉefe kontrolo de la enkomputiligataj tekstoj.

La prezidanto Leif Nordenstorm prezentis proponojn pri malgrandigo de stokoj de kelkaj malnovaj libroj. La eldonejo povos eĉ donaci librojn al Esperanto-kluboj. La estraro decidis pri tio.

En la nova estraro partoprenos Leif Nordenstorm, Roger Nilsson kaj Perolov Johansson. Anstataŭanto estos Andreas Nordström.

Leif Nordenstorm



Kontaktoj kun membroj en Stockholm

Komence de marto 2020, la Esperanto-Klubo de Stockholm (EKS) povis aranĝi kunvenon ĉe ABF kun programo pri enkonduko al la klingona lingvo, kiu estas inventita por filmoj pri eksterteraj aventuroj. La posta planita programo en marto, kun titolo "Aktualaj novaĵoj", devis okazi per telefono, kaj du estraranoj telefonis unuope al pluraj membroj kiuj kutime ĉeestas similajn programojn.

Ankaŭ la dimanĉa programo "Lingva duŝo" devis okazi en alia maniero ol planite, kaj malgranda kvanto da membroj interparolis per programo "skype".

La rondvojaĝo de Aleksandr Melnikov fine de aprilo estis nuligita, ne nur por tri svedaj urboj kiuj planis kunvenojn, sed ankaŭ por kluboj en najbaraj landoj. En retletero, skribita la 24 aprilo el Rostovo, Aleksandr komentas pri la pandemio:

"En Rostovo estas multaj malpermesoj, celitaj al diversaj specoj de izoliĝo. Kaptitaj malobeantoj pagas grandajn monpunojn. Plej verŝajne diversspecaj limigoj daŭros ĝis la mezo de majo." Krome li mencias, ke multaj timas ekonomiajn sekvojn. Li ankaŭ notas, ke oni diras, ke la pandemia situacio en Rusio estas multe pli bona ol en multaj aliaj landoj."

La estraro de la klubo kunsidis du-foje dum marto kaj aprilo, per grupaj telefonvokoj, laŭ iniciato de Soile Lingman, kiu ankaŭ preparis proponon pri datoj de liber-aeraj kafejoj kunvenoj dum la somero.

Ulla Luin

hägvo.info

Esploru
lingvo.info

Pasie pri lingvoj!
Multlingva retejo pri
la lingvoj de Eŭropo

Informiĝu
pri lingvoj

Plia litero pretaj en la vortaro

La grupo kiu laboras per enskribo de la esperanto-sveda vortaro, kiu Roland Lindblom (1931-2016) verkis, nun finfaris plian literon nome *Ĥ*, laŭ informo de Martin Häggström, kiu kutimas trarigardi tion, kion la aliaj grupanoj pretigas.

Per tio, dek el la 28 literoj de la esperanta alfabeto estas pretaj. Ĉiuj aliaj literoj estas enskribitaj, kaj la grupo de proksimume dek personoj laboras je ili.

Ĥ

Samtempe necesos denove iom trarigardi kelkajn el la literoj, kiuj jam pli frue estas notitaj kiel pretaj. Dum la laboroj de la grupanoj, montriĝas ke necesas kelkfoje adapti la komunajn skribregulojn pro novaj bezonoj, kaj en tiu kazo estas bone revizii ankaŭ jam faritajn literojn. Kelkaj pliaj paĝoj da manuskripto estas lastatempe trovitaj, kaj estos iom da laboro kompari ilin kun la jam skribitaj vortoj.

La laboro pri la vortaro estas gvidata de Leif Nordenstorm, prezidanto de la sveda Eldona Societo Esperanto.

Ulla Luin

När och hur hörde du talas om esperanto?

Lennart Svensson samlar underlag till en bok. Svara gärna på hans enkät här:

forms.gle/XEzNjASS88TmKBtTA

Höstens språkvecka

kurser, diskussioner och kultur

23 okt. – 1 nov. 2020

På grund av coronaläget som avrådde befolkningen från resor blev det ingen kongress på Esperanto-Gården i år utan flera möten hölls i stället över internet. Inte heller sommarkursen som vi tänkt ordna midsommarveckan kommer att bli av. I stället bjuder vi till hösträff med esperantokurser, diskussioner och kultur fredagen den 23 oktober till söndagen den 1 november. De första dagarna fokuserar vi på samvaro, gemensamma förberedelser och diskussioner om hur esperantorörelsen egentligen mår och varför, och hur vi kan utforma vad vi gör så det är inspirerande och ger positiva resultat. Onsdag är utflyktsdag och mot slutet av veckan blir programmet mer fokuserat inklusive föreläsningar om läromedel och språkutveckling (inklusive ordboksarbete).

Genom hela veckan ordnas esperantokurser enligt individuella behov, det vi säga vi ser till att det finns undervisning för nybörjare såväl som för längre hunna, och esperantoprogram för barn om vi har deltagande barn. Våra huvudlärare är Tim Morley kaj Paulina Kožuchová, men andra hjälper till så att det fungerar flexibelt. Det är alltså möjligt att få undervisning eller möjligheter att använda språket på din egen nivå oberoende av om du kommer redan i början av hösträffen, i mitten eller för de sista tre dagarna.

Vi har lägre avgift för de första dagarna och ett lite högre dygnspris för de avslutande dagarna. Meddela dina kontaktuppgifter till Esperanto-Gården för närmare upplysningar. Vi har övergått till mobilnummer i stället för fast telefon: +46 70-767 54 55, info@esperantogarden.se.

Vår hemsida www.esperantogarden.se är uppe igen. Närmare uppgifter publiceras på hemsidan och på vår Facebook-sida Esperanto-Gården i Lesjöfors.

Anna Ritamäki-Sjöstrand
Ordförande Esperanto-Gården



En momento dum kiu la tuta homaro suferas pro la koronavirusa pandemio, Uvira, urbo nordoriente de DR Kongo, estis trafita de terura natura katastrofo tutajn nokton kaj matenon de la 17a kaj 18a de aprilo 2020.

ALVOKO DE UEA POR SOLIDARECO AL ESPERANTISTOJ EN UVIRA, D. R. KONGO, PER ESPERO

Pro torentaj pluvegoj, la lago Tanganjiko kaj precipe la rivero Mulongvo transiris siajn fluejojn kaj alfluis ĉirkaŭaĵojn, kie akvo kaŭzis neatenditajn eroziojn, mortigis plurajn homojn kaj kortbestojn kaj faris gravajn materialajn damaĝojn. Dura estas tio, kio sekvis: plurdekoj da mortintoj estis retrovitaj sub koto kaj ruinaĵoj de disfalintaj konstruaĵoj. Plurcentoj da domoj estis detruitaj, el kiuj multaj ne plu uzeblos.

Iom da konsolo por nia komunumo estas tio, ke neniu esperantisto pereis en la katastrofo, kvankam kelkaj el ili kaj familianoj perdis siajn domojn aŭ endomajn havaĵojn, damaĝitaj aŭ forportitaj de la akvo.

Tiuj, kiuj sukcesis vekiĝi kaj fuĝi la danĝeron iris al lernejoj kaj preĝejoj, kie ili ekde de tiam tranoktas en malbonaj mizeraj kondiĉoj. Tio ankoraŭ pli akriĝas pro nuntempa apero de malario:

en pluvsezono multiĝas kuloj, pro katastrofo detruigis kulvualoj, mankas trinkebla akvo kaj sola ŝtata akvoproviza infrastrukturo en la urbo ĉesis funkcii pro detruigo.

Homoj ne havas eblon lavi aŭ ŝanĝi siajn vestaĵojn, kaj Uvira iĝis pli ol kompatinda urbo: inundego, malario, ebola kaj koronavirusa malsanoj, haŭtmalsanoj, ĥolero, malsato kaj grand-iĝanta malsekureco kiel ŝtelado kaj rabado.

Ne estas dubo, ke la homoj en Uvira kaj aparte niaj esperantistaj geamikoj urĝe bezonas subtenon: nutraĵojn por plu vivteni sin, vestaĵojn por surmeti, kuracilojn, kulvualojn, monsumon, kiu utilu por plibonigo de vivsituaĵo kaj, se eblos, ripari difektitajn domojn. Domriparon kaj rehavigon de perditaj aĵoj ili ne povas mem fari precipe pro manko de asekuroj kaj ŝparmono en la lando, kie la homoj vivas kun malpli ol unu usona dolaro tage.

Tial la Afrika Komisiono kaj la Estraro de UEA afable alvokas ĉiujn bonkorajn esperantistojn bonvoli helpi pri la situacio en Uvira.

Ĉiu alternativa mondonaco al la konto *Espero* ĉe UEA kun la celo "*Uvira-20*" estos tre bonvena kaj ne malpli dankata.

Subtenante niajn afrikajn aktivulojn, ni pruvos, ke pli ol simpla lingvo Esperanto estas ankaŭ rimedo por internacia solidareco eĉ en la plej ekstremaj malfacilaj vivsituaĵoj. Efektive tia estis la motivo de Hector Hodler, fondinto de UEA, kies forpason ni speciale memoras cent jarojn poste en 2020. H. Hodler organizis mem la Dumilitan Helposervon de UEA en la periodo de la unua mondmilito, kio estis la unua granda socia servo por paco kaj solidaro en UEA.

Por donaci bonvolu aliri: uea.org/alighoj/donacoj/espero.




La urbo Uvira sub la akvoj, ...

La Esperanto-movado en Uvira estas signife dinamika, cetere danke al junaj sindonemaj esperantistoj, kiuj ĉiam klopodas plivivigi Esperanton en la regiono. Pro la agado de pluraj fortoj ekzistas pli ol kvin Esperanto-kluboj kun entute centoj da membroj tra la urbo. Uvira-esperantistoj aktoris kaj eldonis preskaŭ profesinivele jam 3 filmojn en Esperanto: *Infanaj rajtoj*, *Dank' al la lingvo* kaj *Venĝemo*. Tiun lastan eblas spekti jutube:

youtube.com/watch?v=DhnXZriYVKE&t=395s

Recenzo: La knabo kiu vivis kun strutoj

Kiam la verkisto Monika Zak vizitis Okcidentan Saharon en 1993 ŝi dufoje aŭdis la saman historion. Temis pri knabo, kiu perdiĝis en la dezerto, kaj kiun poste prizogis strutoj. Lia nomo estis Hadaro. Ŝi kompreneble ne kredis la historion sed volonte aŭskultis ĝin ĉar la historio estis bona. Sed post iom da



tempo ŝi eksciis ke Hadaro mortis, sed ke ankoraŭ vivas lia filo. Nur en la jaro 2000 ŝi sukcesis trovi la filon de Hadaro en Alĝerio. Li volonte rakontis pri la aventuroj de sia patro. Post tio Monika Zak verkis libron pri la vivo kaj aventuroj de Hadaro en Okcidenta Saharo.

Li libro nomiĝas *La knabo kiu vivis kun strutoj*. Ĝi estas streĉa romano leginda kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj. En ĝi ni lernas pri kiel Hadaro perdiĝis en la dezerto, pri kiel strutoj komencis eduki lin kaj pri kiel ... Ne, mi ne volas malkaŝi la finon de la libro. Vi mem legu ĝin. Mi tamen povas malkaŝi ke kune kun la strutoj Hadaro spertis senpluvajn tempojn kaj superakvegdon. Li renkontis leonojn, kaj homojn ... Legante la libron oni ankaŭ iom

lernas pri la kulturo de Okcidenta Saharo.

La verkon tradukis Carl-Olof Selenius. La traduko estas flua kaj en bona Esperanto. La libron eldonis www.lulu.com en Usono, kiu eldonis ĝin kiel po-pec-presa libro (beställtryck). Tio signifas ke nur kiam iu mendas ĝin la eldono presas unu ekzempleron. Oni ankaŭ povas legi la libron senpage kiel elektronikan libron. La libro ankaŭ estas mendebla ĉe Eldona Societo Esperanto: esperanto-gbg.org/eldona/

Leif Nordenstorm

Monika Zak. *La knabo kiu vivis kun strutoj*.

Tradukis el la sveda: Carl-Olof Selenius.

216 paĝoj. Lulu 2019.

(Prezo: 80 SEK ĉe Eldona Societo Esperanto).

Aperis 150 libroj en/pri Esperanto

Laŭ la rubriko "Laste aperis" de la revuo "Esperanto" en la 2019a jaro aperis 150 libroj en/pri Esperanto; ilia suma paĝonombro estas 28 194. Se vi volas konatiĝi pli detale kun la pasintjara libroeldonado, legu la tradician (jam la 29an) statistikan revuon de Aleksander Korĵenkov en la printempa numero de "La Ondo de Esperanto" (2020, N-ro303).

La statistiko aperis ankaŭ en la reto <https://sezonoj.ru/2020/05/korzhenkov-7/>. Jen malgranda eltondaĵo el la retpaĝo, kie vi trovas multajn interesajn faktojn:

La ĝenra distribuo estis sufiĉe kutima kun tradukitaj beletraĵoj kiel la plej populara librospeco; atentindas, ke la rikolto de la originala beletro estis pli bona ol kutime.

	1991-2015	2016	2017	2018	2019	1991-2019 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	4802	189	139	127	150	5407
Suma paĝonombro	635.808	32.323	23.353	19.483	28.194	739.151
Nombro de la eldonintoj	1162	75	64	55	84	1247
Averaĝa paĝonombro de 1 libro	132	171	168	153	188	136
Averaĝa prezo de 1 libro (eŭroj)	10,00	12,84	13,01	12,45	13,37	10,33
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	699	20	26	7	18	770
Originala beletro	562	30	15	26	33	666
Traduka beletro	997	28	32	32	41	1130
Lingvistiko, esperantologio	555	23	14	9	8	609
Eo: historio, kulturo, movado k. s.	639	28	17	14	12	710

Baza literatura krestomatio

La 4a eldono de *Baza Literatura Krestomatio* estis eldonita dum 2019. Ĝi estas korektita kaj kompletigita. Antaŭaj eldonoj estas:

- 1a eld. Budapeŝt: HEA, 1979.
- 2a eld. Budapeŝt: HEA, 1982, (284p)
- 3a eld. Budapeŝt: HEA, 1986.
- 4a eld. Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2019, (368p)

Pli da informo sur retpaĝo: <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga121.htm>

Du versioj: 1982 2019




Tove Jansson (1914-2001) kreskis en svedlingva artist-familio en Helsinko. Ŝia patro estis skulptisto, sed la ĉefan familian enspezon perlaboris ŝia patrino per siaj desegnoj.

Tove jam infanaĝe kaj junaĝe desegnis, sed ankaŭ verkis rakontojn. Post arto-studoj en Stokholmo ŝi revenis 19-jara al Helsinko. Iom post iom ŝi iĝis konata desegnisto. Ŝi faris ilustraĵojn por infanlibroj sed ankaŭ satirajn desegnojn pri aktualaj temoj.

75 jaroj

En ŝiaj desegnoj baldaŭ aperis kelkaj fantaziaj figuroj, kiuj iĝis ŝiaj karakterizaj rekoniloj. Unu el ili, la Mumintrolo, iĝis ŝia kva-zaŭa identigilo. En la mezo kaj fino de la 30aj jaroj ŝi tamen precipe studis kaj praktikis pentradon.

Dum la milita tempo de 1939 ĝis 1945 ŝi ekverkis por infanoj. Jen ŝi komencis krei tiun apartan mondon, kiu iom post iom iĝos Mumintrolo. La unua libro, *La etaj troloj kaj la granda inundo*,



Bildoj el la libro *Vinter i Mumindalen*



aperis en 1945, do antaŭ 75 jaroj. Ĝi estas relative tradicia fabelo por infanoj. Sed ŝi tuj daŭrigis per nova aventuro, kaj jam en 1946 aperis *Kometo en Mumintrolo*, kiu estas sendependa drama kreaĵo, aventuro kiu baldaŭ iĝis fama infanlibro de tiu speco, kiu fascinas ankaŭ plenkreskulojn. Same kiel postaj verkoj, ĝi baldaŭ aperis en alilingvaj tradukoj.

En 1948 aperis *Ĉapelo de sorĉisto*, kiu uzas fantazion kaj magion en maniero aparta de Tove Jansson. En 1950 sekvis *Memoroj de Mumintrolo*, kiu parodias la figuron de patriarko fanfaronanta pri sia sovaĝa jun-aĝo, kaj en 1954 *Somermeza dramo*, kie la aŭtorino enkondukas ludon per roloj-rolantoj kaj paralelajn ago-tavolojn – sufiĉe komplikaj literaturaj rimedoj en infanlibro.

En 1957 aperis *Vintro en Mumintrolo*, kiu uzas precipe sentojn, etosojn kaj imagojn pli ol agojn. Post ok jaroj, en 1965, sekvis *La patro kaj la maro*, kie la familio forlasas sian valon, ĉar Mumintrolo volas sperti aventuron sur insulo. Ĉi tie la tavoloj por plenkreskuloj dominas super la infanlibra dimensio. Kaj fine, en 1970, aperis *Malfrue novembre*, melankolia adiaŭo al Mumintrolo, kie ĉefrolas la tuta Mumintrolo-familio, kvankam ĝi mem ne ĉeestas en la rakonto.

El ĉiuj figuroj en Mumintrolo – kaj da tiaj troviĝas pluraj dekoj – troviĝas du evidentaj portretoj. Mumintrolo estas la patrino de Tove. Kaj Tu-tiki, kiu aperas en Mumintrolo, estas ŝia kunvivantino Tuulikki Pietilä. Certe ankaŭ aliaj proksimuloj donis trajtojn al kelkaj figuroj. Sed la plej multaj el ili ludas rolon en-karnigi apartan homan trajton.


Tamen la figuroj tamen neniam iĝas unudimensiaj. Tove Jansson vidis kaj vidigis la homecon en ĉiu individuo de sia svarmanta galerio.

La supra listo de verkoj pri Mumintrolo enhavas rakontojn ilustritajn. Krome aperis en 1962 novelaro *Det osynliga barnet* (esperantigo de Eckhard Bick: *Mumintrolo*, 1984), kaj du bildlibroj por infanoj kun versoj: Kio sekvis jen? Libro pri *Mimlino*, *Mumintrolo kaj Eta Mim* el 1952, kaj *Kiu konsolos la kniton?* el 1960. Krome Tove Jansson kreis bildstrian rakonton, kiun poste daŭrigis ŝia frato Lars Jansson. Surbaze de la Mumintroloj ŝi kreis ankaŭ teatraĵojn.

Tove Jansson mem asertis, ke ŝi verkas ĉefe por si mem. Ŝi tamen deklaris, ke “en ĉiu infanlibro devus troviĝi vojo, kie la aŭtoro haltas, sed la infano povas plui”. Evidente la unuaj Mumintrolo-verkoj direktiĝas pli multe al infanoj, dum la lastaj enhavas pli multe da eroj por plenkreskuloj aŭ adoleskuloj, kiujn okupas ekzistadaj demandoj.

Tove Jansson verkis ankaŭ membiografian verkon, *Filino de skulptisto* el 1968, kaj plurajn literature valorajn novelarojn en la 70aj kaj 80aj jaroj.

Sten Johansson



Tove Jansson en 1956 kun mumintroloj figuroj. /El Vikipedio (public domain)